Bonvenon al la Bostona *E*-Festo!

La Esperanto-Societo de la **Masaĉuseca Instituto de Teknologio** (MIT) fieras bonveni la jarkongreso de ELNA al sia tereno! Malkiel dum la Bostona *Te*-Festo, neniu teo ruiniĝos! En tiu ĉi anonco, vi trovos la atenditajn informojn pri kiel rezervi hotelan aŭ universitatan loĝlokon. Ni inkluzivas informojn ankaŭ pri la invititaj muzikaj gastoj kaj mallonga resumo de la kongresa programo. La aliĝilo kune venas sur aparta paĝo. Se vi bezonas pliajn ekzemplerojn, presebla versio de la aliĝilo elŝuteblas el la kongresa retpaĝaro, kies adreso aperas sur la kovrilo. Ankaŭ pli da informoj pri la kongreso kaj reta aliĝilo haveblas ĉe la retpaĝaro. Ne prokrastu: Aliĝu kaj rezervu viajn ĉambrojn frue! Ni antaŭĝuas vidi vin en julio!

Nuligo de registriĝo
Kongresa kotizo minus administra kosto de po $5 repagiĝos se ni ricevos skribitan nuligpeton antaŭ la 1-a de junio.

Koncertoj de profesiaj Esperanto-muzikistoj!

Ĉefaj Programeroj

Ĵaŭdon
- ★ Tuttaga kunsido de la ELNA-estraro. Ĉiu ELNA-ano rajtas ĉeesti kaj observi la decidojn de sia estraro.
- ★ Vespera akcepto por interkonatiĝi kun aliaj ĉeestantoj

Vendredon
- ★ Prezentaĵoj kaj diskutoj tra la tuta tago
- ★ Subĉiela vespera pikniko kaj koncerto de Esperanto-muzikistoj JoMo kaj Kimo
- ★ Nokta promeno laŭ la rivero por rigardi la piroteknikaĵojn kaj aŭdi la Bostonan Simfonian Orkestron

Sabaton
- ★ Pliaj prezentaĵoj, diskutoj, ludoj, gvidataj ekskursoj en Bostono, ktp
- ★ Bankedo ĉe MIT, kun pli da muziko kaj spaco por dancadi

Dimanĉon
- ★ Lastaj kunvenoj kaj diskutoj kaj la oficiala kongresa fermo
- ★ Posttagmezaj ekskursoj al la urbo
- ★ Tempo por trafi la buson por tiuj kiuj iros al la NASK Esperanto-kursoj en Vermont

Libroservo de ELNA la tutan semajnfinon!

Venu al semajnfino de muziko kaj festado en

BOSTON

Massachusetts



3 – 6 julio 2003

por la 51ª Kongreso de ELNA

http://esperanto.org/ELNA/kongreso2003

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
http://www.esperanto-usa.org
(510) 653-0998

Muziko! Dancado! Plia Muziko!

Ĉeestantoj de la ĉijara kongreso bonŝancas, ĉar ni invitis du famajn Esperanto-muzikistojn el Eŭropo koncerti la vendredan kaj sabatan noktojn! Sed la amuziĝo ne limiĝas al tio. La muzikistoj partoprenos la kongreson ankaŭ ekster la scenejo, dum la tagoj dividante kun ni siajn amuzemajn karakterojn kaj dum la noktoj kunfestante kun ni per muziko kaj dancado post la kutimaj kongresaj programoj.



JoMo komencis muziki en la jaro 1977 kaj esperantiĝi en 1988. Tute nature li do decidis kanti kaj verki en la lingvo internacia. Li surpiedigis sian propran grupon, La Rozmariaj Beboj, kiu konatiĝis komence de la jaroj 90 en la franca alternativa rok-medio. La grupo turneis en diversaj landoj (en kiuj Ĉinio) kaj produktis du albumojn. Post disiĝo de La Beboj, JoMo kreis novan grupon, Liberecanoj, kun kiu li surbendigis sep-titolan liberecaneman albumon kaj kreis la unuan rekordon de multlingva koncerto (22 kanzonoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la libro *Guinness*. En 2001, li sole surbendigis tutan Esperantan albumon titole *JoMo friponas*, kiu kaptas la pli personan kaj folkan stilon de liaj solaj koncertoj ĉe Esperanto-festivaloj tra Eŭropo. Flanke de muziko, li projektas eldoni konversaci-libron pri la gaskona lingvo kaj vortaron pri rugbeo. Krom tio, li havas polan edzinon, sepjaran filinon (kiu jam komencis surscenejiĝi por kanti en la pola), ne fumas, ne trinkas alkoholon, ne manĝas viandon sed havas unu malvirton: li multe parolas.

Kim Henriksen (aux **Kimo** en Esperantio) muzikumis kaj amuzis ekde juna aĝo. Je la aĝo de 2-jaroj, li falis el fenestro de dua etaĝo. Nenio rompiĝis, tamen eble tio influis lian frenezecon surscenejan (kaj eksterscenejan!). Kiel denaska Esperanto-parolanto, li ĉeetis multajn junularajn renkontiĝojn, ĉe kiu li renkontis aliajn junajn Esperanto-muzikistojn kaj el tiuj renkontoj estiĝis Amplifiki, unu el la plej famaj Esperantaj rokgrupoj. En tiuj fruaj jaroj, Kimo verkis la kanton "Sola," kiu nun estas nepra kutimaĵo ĉe junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Kimo estis prezidanto de la Esperanto Junulara Dana Organizo, prezidanto de la Dana Esperanto Asocio, kaj kunaranĝis kelkajn KEF-ojn (Kultura Esperanto-Festivalo) inkluzive de la venonta en Svedio ĉi-somere. Li nun koncertas kun la dana-serba-pola muzikgrupo Esperanto Desperado, kies disko *broKANTAĴOJ* enhavas kelkajn refaritajn kantojn de Amplifiki.

Loĝado

Ni aranĝis kun loka hotelo kaj kun MIT por provizi du loĝ-elektaĵojn kiuj plaĉos al diversaj gustoj. Ambaŭ lokoj situas kelkajn stratojn for de la MIT-konstruaĵoj kie okazos la kongreso. La hotelo estas ekster la universitata tereno, pli proksime al la metroo kaj la vendejoj kaj restoracioj de Cambridge. La vojo de la hotelo ĝis la kongresejo estas laŭ bone lumigita kaj homplena strato. La vojo de la studentaj dormejoj estas tute en la universitata tereno, laŭ vico da dormejoj kaj sportkampoj. Dum la somero, studentoj kaj infanoj de someraj programoj loĝos en la dormejoj.

Ni aranĝis mirige malalta tarifo kun la **Hotelo University Park**, konata ankaŭ kiel **Hotel@MIT**. Ĝi estas tute nova hotelo kun tegmenta ĝardeno, ekzerco-ĉambroj, senpaga Interreta aliro, kaj multaj aliaj agrablaĵoj. Du-homaj ĉambroj kostas $109, tri-homaj $129, kaj kvar-homaj $149, plus 12.45% de impoŝto. Tiu ĉi tarifo validas por 4 tagoj antaŭ ĝis 3 tagoj post la kongreso, sed oni devas rezervi antaŭ la **3a de junio, 2003**. Por rezervi ĉambron, rekte kontaktu la hotelon per telefono al (617) 577-0200 aŭ retpoŝto al reservations@hotelatmit.edu. Oni devas mencii "51st Annual Congress of ELNA" por ricevi la kongresan rabaton. Tiu ĉi tarifo ne haveblas per la senkosta telefon-numero (kiu komenciĝas per 800) aŭ per la retpaĝaro de la hotelo, **http://www.hotelatmit.com**

Unu-homaj kaj du-homaj studentaj ĉambroj lueblas en klimatizitaj dormejo ĉe MIT. Du-homaj kostas po $65 nokte por la ĉambro ($32.50 pagas ĉiu persono) kaj unu-homaj kostas po $50 nokte. Kelkaj tri-homaj eble havebliĝos, sed detaloj pri la ĉambroj ne certiĝos ĝis meza marto. Oni rezervas per la kongresaj organizantoj kaj pagas al ELNA. Estas spaco en la aliĝilo por indiki rezervojn. Oni devas rezervi almenaŭ tri semajnojn antaŭ la kongreso.

Pliaj informoj pri loĝ-aranĝoj legeblas ĉe la kongresa retpaĝaro:

http://esperanto.org/ELNA/kongreso2003